Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO JULIO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Raĝo Singh pasigis kelkajn jarojn en Aŭstralio. Kiam li finfine hejmen venis demandis lin lia patro: "Ĉu aŭstralianoj estas bonaj? Ĉu ili havas religion?

Jes, Paĉjo, ili havas ŝtatan preĝejon, liberan preĝejon kaj Bingon".

"Ĉu Bingo? Kio estas tio?"

"Oni iras al la Bingopreĝejo ĉiun vesperon. Tie staras la plej supera pastro kriegante la sanktajn numerojn. La paroĥanaro faras krucojn sur la preĝokartoj. Poste iu el ili starigas sin kaj kriegas "Bingo," kaj ĉiuj aliaj diras "ho Dio!"

Siajn kotizojn por 2009 al "Esperanto en Sudaŭstralio" pagis jam Margaret, Indrani, Katja, Trevor, Audrey, Bob, Carol kaj Brendan.

La lasta kunveno en Clarence Park

Merkredon la 3an de junio okazis nia lasta kunveno en Clarence Park. Do ni ĉiuj estis iom malĝojaj, sed nur iom. Nun ni antaŭĝojas renkontiĝi en la mezo de Adelajdo. Ni esperas, ke tio estos iom pli bona, ĉar la distanco fariĝos pli egala al ni ĉiuj.

La nova renkontiĝejo situas en 'La Skatolfabriko', 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.

Ĉiun gloron al nia Pat

Vidu kion "Unitarian Church" skribis pri nia Pat:

"Dum nia pasinta kunveno Pat Palmer tre interese parolis al ni pri Esperanto. Ŝi parolis pri ĝia pola iniciatinto, L.L. Zamenhof, kaj la malfacilaĵoj, kiujn li suferis starigante la universalan lingvon ĉie en la mondo. Iom post iom ekestis multaj lerno- kaj parologrupoj. Pat partoprenas tian grupon en Adelajdo, kiu varme bonvenigas novajn membrojn.

Ŝi montris al ni librojn verkitajn en Esperanto, kaj disdonis folion montrantan kiom relative facile estas lerni ĝin. Ĝi havas nur kelkajn simplajn regulojn. Nin tre interesis vidi la familiarajn radikvortojn ekz. hundo, patro, floro, arbo, infano ktp. Afiksoj ŝanĝas la sekson, faras adjektivojn, verbojn kaj adverbojn ofte trovataj en la latina, franca, germana ktp. kiuj ofte estas tre konataj al ni.

Se tio ĉi interesas vin, tiam parolu kun Pat.

Maureen Kowalick

"Kion vi deziras, ke la kristnaskulo alportu al vi?"

"Du aûtojn, du flugmaŝinojn, du traktorojn, du buŝharmonikojn..."

"Kial vi deziras po du el ĉio chi tio?"

"Ĉar kiam Paĉjo ludos per unu, mi povos ludi per la alia!"

La Universala Kongreso de Esperanto

Baldaŭ okazos la 94a Universala Kongreso de Esperanto, fakte de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto. Sed sendube vi planas pasigi iom pli longe en la urbo de la naskiĝo de la iniciatinto de Esperanto, Lazaro Ludoviko Zamenhof. Li naskiĝis tie antaŭ 150 jaroj. Estos granda honoro viziti la urbon kaj partopreni aktive en la kongreso. Granda honoro, kiu eblas al nur tre malmultaj el ni. Tiuj el vi, kiuj iros Bjalistoken komprenu tion! Ne malŝparu la tempon sed partoprenu kiom eble plej multajn programojn.

Mi rekomendas al vi ne malŝparu vian tempon angle parolante. Ne imagu al vi, ke ĉiuj en la mondo komprenas la anglan aŭ eĉ ke ili preferas ĝin al Esperanto. Certe ne en Bjalistoko. Vi estos tie i.a. por progresigi Esperanton. Uzadu Esperanton la tutan tempon eĉ parolante kun viaj samlandanoj. Tiel vi plibonigos vian personan Esperanton kaj plialtigos vian lingvonivelon. Veninte hejmen vi montros al ni ĉiuj, ke vi multon lernis en Bjalistoko, kaj ni fieros pri vi !

Tial vi partoprenu ankaŭ unu el la ekzamenoj tie. Okazos tri ekzamenoj: B1 skriba, kiu kostos aŭstraliajn dolarojn 55,00. B1 parola kostos same. B2 skriba kostos $ 60,00. Ankaŭ B2 parola kostos $60,00. C1 skriba kostos $ 68,00 kaj C1 parola kostos la saman. Montru al la kongresa samideanaro, ke vi serioze interesiĝas pri Esperanto kaj

provu trapasi almenaŭ unu el tiuj ekzamenoj. Mi deziras al vi bonŝancon !

Estis kristnaskovespero kaj buĉisto Jones jam vendis ĉion en la vendejo escepte de tre malgranda kolbaso. Du minutojn antaŭ fermotempo s-ino Smith eniras la vendejon.

”Ho, mi esperas, ke vi ankoraŭ havas iom da kolbaso.”

Buĉisto Jones montras al s-ino Smith la kolbaseton.

“Hm, ĝi vere estas tre malgranda, ĉu vi ne havas alian?”

“Kompreneble” diras buĉisto Jones, bona komercisto. Li iras en la malantaŭon de la vendejo kaj enmetas la kolbason en salon. Tiam li reeniras la antaŭon de la vendejo kaj montras ĝin al s-ino Smith.

”Nu, kion vi opinias pri tiu ĉi?”

”Hm. Jes. Ankaŭ ĝi estas tre malgranda, do mi prenos ambaŭ el ili !”

Gravaj Esperanto-okazaĵoj:

Merkredon la 1an de julio je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Poste en julio nin gvidos Eileen tra la mangloarbaro.
La 94a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.
Merkredon la 5an de aŭgusto je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
De vendredo la 21a ĝis dimanĉo la 23an de aŭgusto okazos Somerkursaro de Korea Esperanto-Junularo.
Merkredon la 2an de septembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Iam en septembro Katja invitos la virinojn al sia hejmo por florarangĝado. Necesos trovi okupadon por la viroj.
Merkredon la 7an de oktobro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare la 24an de oktobro.
Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.
Sabaton la 7an de novembro ni posttagmezumos ĉe Trevor.
La AEA-kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de novembro en Kanbero.
Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo ni renkontiĝos en la Box Factory Community Centre, 59 Regent Street South, Adelajdo 5000.

Dimanĉon la 13an de decembro ni, ĉe Indrani, festos la 150an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.
La Novzelanda Kongreso okazos verŝajne de la 3a ĝis la 9a de januaro 2010.
La AEA-Somerkursaro okazos en Sidnejo de la 10a ĝis la 25a de januaro 2010.
En 2010 la Universala Kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.
Inter la 9a kaj 23a de julio 2011 okazos la 100a AEA-kongreso en Adelajdo espereble kune kun la ILEI-konferenco.

Rigardu filmojn pri Universala Esperanto-Asocio

UEA lanĉis novajn servojn interretajn. Meze de majo aperis la unua numero de "UEA viva", 10-minuta filmĵurnalo kun raportetoj pri aktualaĵoj en UEA, TEJO kaj Centra Oficejo, pri novaj libroj ktp. Ĝis nun aperis jam du numeroj.

Iom pli frue ekfunkciis reta kinejo, kie eblas rigardi programerojn de la aprila Malferma Tago de la CO kaj historiajn dokumentojn jpri la unua UK en 1938 kaj pri UK en 1959. Iom post iom oni aldonos aliajn filmojn. "UEA viva" troviĝas en http://www.youtube.com/UEAviva

La reta kinejo troviĝas en http://ipernity.com/doc/97850/home/video

La aperritmo de numeroj de "UEA viva" kaj de novaj filmoj en la reta kinejo dependos de ilia populareco. Vi estas invitata vidi kaj diskonigi ilin.

K. Steele

Ĉeestis Larso mezvintran diservon. La pastro savis lin. Post la diservo li devis esti baptita. La pastro kaj du helpantoj irigis Larson al la mezo de glacikovrita lago. La helpantoj hakis grandan truon en la glacio kaj enakvigis Larson kaj iom poste eltiris lin.

"Ĉu la akvo estis malvarma?" demandis la pastro.

"Ne, tututute neee, ĝiĝiĝi estis treege komforforta!"

"Refoje enmetu lin", diris la pastro. "Li ankoraŭ mensogas!"

Esperanto-Somerkursaro de KEJ

De la 21a ĝis la 23a de aŭgusto 2009 okazos la Esperanto-somerkursaro de Korea Esperanto-Junularo por

tiuj, kiuj deziras lerni Esperanton. Oni atendas kvardekojn da gelernantoj.

Ĉi-jare ĝi okazos kunlabore kun la Esperanto-rondo de la universitato Yonsei (Wonju-universitata tereno), kio montras plifirmiĝantajn rilatojn inter KEJ kaj universitataj Esperanto-rondoj. Des pli ghojige, la partoprenkotizo estas relative malalta danke al koreaj patronoj kaj aŭspicio de la universitato Yonsei.

La somerkurseja adreso: Yonsei, Wonju (Esperante Ŭonĝu) Korea Respubliko (ĉirkaŭ 1,5 horojn for de Seulo).

La kurskotizo estos nur 25.000 ŭonoj. Eksterlandanoj rajtas ĉeesti tute senpage.

Provizoraj programeroj: Esperanto-kursoj (baz- kaj meznivelaj), prelego pri la historio kaj kulturo de Esperantujo. Bankedoj, ekskurso, lernado de sportodanco de la universitato Yonsei ktp. (Multe pli da programeroj sekvos).

Bonvolu sendi viajn nomon, aĝon, sekson, Esperanto-nivelon kaj aliajn aferojn bezonatajn al gloro@saluton.net.

Plej amike,

Song Ho-young, prezidanto de Korea Esperanto-Junularo kaj komitatano A kaj azia komisiito de TEJO.

Post la firmaa festo la estro diras al Jones: "Mi ĵus aŭdis, ke vi pasintan nokton pusis unuradan ĉarumon tra la urbo. Tio ne estas bona, ni pensu ĉiame pri la renomo de la firmao, ĉu ne?"

"Jes, bona sinjoro estro, sed mi ne povis trovi taksion, kaj mi sciis, ke vi volas hejmen iri kiom eble plej rapide."

Malaperas Esperanto el Budapeŝta universitato

La mondfama Esperanto-fako ĉe la ĉefa budapeŝta universitato ELTE malaperas. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni ĉesigis la akceptadon de studentoj, kaj fakte la lastaj du nun okupiĝas pri siaj diplomlaboroj. La usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation faris provon savi la Esperanto-fakon, proponante financan subtenon, sed la internaj konfliktoj de la hungara Esperanto-movado malebligis konstruan aliron.

Ek de la jaro 1966 ĉe la katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistikoj de la budapeŝta universitato ELTE (Eőtvős-Loránd-Universitato) funkciis altnivela Esperanto-fako. Esperanton oni povis studi ne kiel ĉeffakon, sed kiel la unuan kromfakon.

Unu el la ĉefaj motoroj de la Esperanto-fako ek de 1966 ĝis sia morto en 1987 estis István Szerdahelyi. En la Budapeŝta Esperanto-Fako studis multaj konataj Esperanto-aktivuloj hungaraj, sed ankaŭ alilandaj.

Post la falo de komunismo en Hungarujo falis ankaŭ la prestiĝo de Esperanto kaj la ĝenerala interesiĝo. Samtempe la financado de la universitato estis striktigita, kaj antaŭ kelkaj jaroj la akceptado de novaj studentoj por la Esperanto-fako estis ĉesigita.

Dum kelkaj jaroj la nombro de studentoj en ELTE trioniĝis al malpli ol 10.000, kaj por ŝpari monon oni decidis devige pensiigi preskaŭ ĉiujn instruistojn pli ol 62-jarajn. Inter tiuj estis ankaŭ lekciisto de la Esperanto-fako, Iván Bujdosó, kiu iĝis 62-jara en 2006.

Lia maldungiĝo signifis ankaŭ, ke la universitato rezignis pri la planoj transformi la malnovan, universitatnivelan Esperanto-fakon en novan, malpli ampleksan lingvoinstruistan programon, kiu tamen ebligus al la studentoj ankaŭ estontece havi kursojn pri Esperanto kiel parton de sia universitata edukado.

Ĉar la oficiala kialo por la maldungo de la lekciisto estis manko de financado, la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation serioze konsideris la eblecon kontribui al la salajrokostoj por konservi la Esperanto-programon de la universitato.

La sekcio de aplikata lingvistiko pozitive sintenis al la propono pri financa subteno, kaj printempon 2007 Humphrey Tonkin kiel reprezentanto de Esperantic Studies Foundation persone vizitis la universitaton por diskuti la praktikajn detalojn. Tamen la dekano de la katedro tute rifuzis renkonti lin, kaj la rektoro de la universitato ne konsentis subskribi kontrakton pri la financa subteno.

En la sama periodo kulminis la interna skismo de la Esperanto-movado en Hungarujo. La nova sed mallongtempa prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio,

György Nanovfszky, denuncis la antaŭan prezidanton László Szilvási ĉe la polico pro asertataj financaj misagoj, kaj la tuta hungara movado disfalis en du batalantajn frakciojn.

La skismo evidente influis la etoson de la vizito de Humphrey Tonkin, ĉar unu el la tri instruistoj de la Esperanto-fako eĉ ne partoprenis la kunvenojn. Sendube la skismo malaltigis, laŭ la universitata estraro, ankaŭ la jam nealtan prestiĝon de Esperanto, kaj do nerekte kontribuis al la fina malapero de Esperanto el la programo.

Intertempe la polica esplorado estis finita, financaj misagoj ne estis trovitaj, kaj la nova estraro de Hungara Esperanto-Asocio publike pardonpetis al la senkulpe akuzita eksprezidanto. Tamen la skismo ne malaperis, kaj el la iam elstara Esperanto-fako de la budapeŝta universitato restas nur du studentoj.

La malĝojiga fakto estas, ke ni estas la lastaj studentoj, ĉar la "kara" dekano decidis, ke la fako ĉesigu sian funkciadon. Verdire ni ofte sentas, ke ni estas superfluaj malgravuloj en la okuloj de la universitata burokratio, skribis unu el la studentoj lastatempe en diskutlisto de hungaraj esperantistoj.

El Libera Folio

"Kiam mi estis malsana, mi iris al la kuracisto, ĉar li devas ja vivi. Li skribis recepton, kiun mi alportis al la apotekisto, ĉar li devas ja vivi. Sed la medikamenton mi elverŝis en la lavujon, ĉar ankaŭ mi devas ja vivi."

Jen la prezoj de la venonta Somerkursaro:

Nur kurso:	pago antaŭ la 30/9	post la 1/10
a) AEA-membro	$ 465,00	$ 560,00
b) AEA-membro – koncesio	390,00	470,00
c) Aliaj	510,00	610,00
ĉ) Aliaj kun koncesio	430,00	515,00
Ĉiutaga loĝado, sed sen kurso:		
a)	98,00	118,00
b)	90,00	108,00
c)	108,00	130,00
ĉ)	99,00	119,00

Partoprenado en ĉio:

a)	**1.550,00**	**1.850,00**
b)	**1.500,00**	**1,790,00**
c)	**1.700,00**	**2,030,00**
ĉ)	**1,650,00**	**1,970,00**

Ekstraj tagoj, ĉiutage:

a)	**82,00**	**98,00**
b)	**80,00**	**96,00**
c)	**98,00**	**118,00**
ĉ)	**90,00**	**108,00**

Malgranda Urbano petas la najbarinon ĉu li rajtas pruntepreni ŝian tondilon.

"Jes, kompreneble eta Urbano" diras ŝi, "sed ĉu via panjo ne havas tondilon?"

"Jes, ŝi havas, sed mi ne rajtas tondi ŝtaldraton per ĝi !"

La ruĝa sago montras la novan renkontiĝejon



Eniro al Regent Street South el Halifax Street